N-ro 2 - Marto 2019

# VENTO

Veksilologia revuo en Esperanto



# VENTO

## Veksilologia revuo en Esperanto

Eldonita de Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Adreso: esperanto14@ono.com

*Editado en Córdoba (España) por Asociación Andaluza de Esperanto.*

*Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

ENHAVO

Dankojn pro la Bonveno.......................................................... 3

La Svisa Standarado ne ĉiam kvadratas .................................... 5

La E-flago kaj la funebraj ceremonioj ....................................... 9

Lastaj informoj pri standardoj ........................................ 12

La fotografaĵo de niaj legantoj........................................ ........ 14

La kosova flago: la rezulto de internacia konkurso.................... 15

La Angulo de la Blazonoj: Tebo.... ................................. 19

Kiel kunlabori kun VENTO ......................................... 20

Humuro ........................................................................... 21

*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj en la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentataj. La sola apogo de nia revuo rilatas al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta Homaro.*

# *Dankojn pro la Bonveno*



Ofte la esperantistaro estas konsiderata kiel stagna movado, kiel silentema grupo kiam aperas nova provo por la disvastigo de la internacia lingvo. Tamen, tio ne okazis post la apero de la unua numero de *VENTO.* En la redakcio de la revuo oni ricevis dekon, preskaŭ centon da mesaĝoj kaj leteroj bonvenigantaj la novan revuon. Same, la revuo mem ricevis preskaŭ 300 vizitojn, do, supozeble, nian revuon legis pli ol 200 homoj tra la tuta mondo. Kaj ĉi ĉio, estas necese averti ĝin, sen la apero de informoj pri la naskiĝo de nia revuo en la plej disvastigitaj informiloj en nia lingvo, malgraŭ la fakto, ke ni dissendis informojn pri tio al ili. Tiel, oni povas diri, ke tiuj bonvenoj ŝuldiĝis nur al la disvastigo pere de la telegrama veksilologia grupo kaj al la tvitera paĝo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Do, multajn dankojn al ĉiuj kiuj kontaktis kun *VENTO* kaj apogis ĉi tiun novan projekton.

Kion fari nun? La revuo naskis samtempe novan asocion, la veksilologian grupon en la internacia lingvo kaj se ĝi fine sukcesas, oni devas havi plenumendajn projektojn, ni prezentas tiujn du unuajn atingeblajn celojn dum la jaro 2019:

1) Oficialigi la asocion *V.E.N.T.O*-n kiel fakan asocion de UEA. Cele al tio, ni bezonas la apogon de almenaŭ 25 homoj. Ni ne petas kotizojn, ni nur bezonas leterojn sciigantajn pri via preteco fariĝi

membro de ĉi tiu naskiĝanta asocio. Kiel dirite, ni ricevis bonvenigantajn mesaĝojn de dekoj da homoj, tamen malmultaj el ili informis pri sia deziro aliĝi al V.E.N.T.O.

2) Kiel dua projekto ni deziras eldoni nian unuan libron, tio estas vortaro pri veksilologio, verŝajne ankaŭ pri heraldiko, tamen ne necese ankaŭ pri tio. Ni scias, ke siatempe oni eldonis tiun vortaron fare de la ĉeka Jaroslav KLEMENT, sub la titolo *"Heraldiko Veksilologio: terminaro en Esperanto".* Tamen, ni ne sukcesis trovi ĝin, do se iu el niaj karaj legantoj sukcesas trovi kopion de tiu vortaro, por ni estus granda helpo ricevi tiun vortaron cele ĝian kompletigon en baldaŭa nova eldono.

Nu, jam estas tempo prezenti al Vi ĉi tiun duan numeron de la revuo, kiu aperas akurate kaj dum la monato aprilo 2020, kiel nia promeso. Ni esperas, ke ĝi plaĉos al Vi kaj kompreneble ĉiaj komentarioj pri ĉi tiu nova numero estos ankaŭ ege bonvenaj.

Bonan legadon al ĉiuj !

*José María Rodríguez Hernández*

*Andaluzio – Hispanio*

*Veksilologia Esperantista Tut-monda Organizo*



# *La svisa standardo ne ĉiam kvadratas*

Unua-vide la ĉefa diferenco inter ĉiuj standardoj baziĝas sur la koloroj kaj simboloj aperantaj ene de ili, tamen, okulfrape aperas propra karakterizaĵo de ĉiu flago: la proporcio. Ŝajnas, ke ĉiuj standardoj estas tute similaj, tamen ne ĉiuj flagoj havas similajn proporciojn egale al rektangulo. Unu el tiuj standardoj, kies proporcio ne sekvas rektangulajn formojn, estas la svisa flago, kies formo estas kvadrato. Tamen, ĉu tiu proporcio de la svisa standardo ĉiam egalas? Tute ne, ni vidu kelkajn esceptojn.




Svisaj sportistoj en la Vintraj Olimpikaj Ludoj en Pieong-Chang (Sud-Koreio) 2018.

Unu el tiuj momentoj kiam la svisa flago ne estas kvadrato, sed rektangulo, okazas dum la ceremoniaj paradoj je la komenco kaj la fino de la Olimpikaj Ludoj. La Internacia Olimpika Komitato aprobis, ke post la Olimpikaj Ludoj de Ateno en la jaro 2002 ĉiuj standardoj devus havi

similajn proporciojn, kun la celo eviti nenian elstariĝon kaj diferencon inter ŝtatoj, ĉar la olimpikaj reguloj serĉas la respekton kaj la egalecon de ĉiuj popoloj.  Tiel, eĉ la nepala standardo, kies plej okulfrapa karakterizaĵo estas la fakto, ke ĝia formo egalas al du trianguloj, okaze de la Olimpikaj Ludoj tiuj trianguloj aperas ene de blanka rektangulo.



*Vinicius*, unu el la emblemoj de la Olimpikaj Ludoj en Rio-de-Ĵaneiro en la jaro 2016 kun la flago de Nepalo, laŭ la olimpikaj proporcioj.

La svisa flago ne estas kvadrato nur okaze de la Olimpikaj Ludoj, tiel ĝi ondumas kun rektangulaj proporcioj ĉe ŝipoj.  Jes, Svisio estas sen-mara ŝtato, tamen trideko da komerc-ŝipoj kaj pli ol 2,000 jaktoj portas la svisan flagon tra maroj kaj oceanoj, kaj ne kiel kvadrato sed ene de rektangula proporcio. Tio ŝuldiĝas al decido adopita de la svisa registaro dum la dua mond-milito, tiam oni decidis adopti flagon kiel eble plej similan al tiuj jam ondumantaj ĉe ŝipoj.  Tamen, ĉi tiu leĝo ne koncernas la ŝipojn ene de svisaj akvoj, nuntempe jaktoj kaj polic-ŝipoj kiuj navigadas tra la svisaj lagoj portas flagon kun kvadrataj proporcioj.


Fine, oni devas diri, ke la svisa ne estas la sola kvadrata standardo se paroli pri ŝtataj flagoj. Ankaŭ tiu de Vatikanurbo estas kvadrato, kvankam oni devas diri unue, ke la proporcioj de ambaŭ flagoj similas, pro la fakto, ke la armeo de la malgranda vatikana ŝtato estas formata de svisaj civitanoj, la fama *Svisa Gvardio*, ĉi tiu gardistaro adaptis la blankan kaj flavan kolorojn de Vatikanurbo al la proporcioj de la nacia svisa flago.



Ŝipo naviganta en svisa lago kaj portanta kvadratan nacian flagon.

Sube, svisa rektangula flago en la pobo de komerc-ŝipo






Memoru, ke laŭ rekomendo de Universala Esperanto-Asocio, ĉiuj Esperanto-flagoj estas verdaj, escepte de la blanka kvadrato enhavanta la veredan stelon, kaj ili devas konformi al jenaj proporcioj.

Kunlaboru kun **VENTO**

La revuo aperas kvar-foje en la jaro. La venonta numero aperos komence de la monato Julio 2019. Se Vi deziras kunlabori kun ĉi tiu projekto, sendu Vian artikolon, informon, fotografaĵon, ktp antaŭ la 15-a de junio 2019 al:

esperanto14@ono.com


# *La E-flago kaj la funebraj ceremonioj*

Okaze de funebraj ceremonioj ekzistas specialaj reguloj ĉiu-loke kaj kelkaj el ili rilatas al uzo de flagoj. Ni vidu nun kiamaniere oni devas agadi se la esperantista standardo ĉeestas funebran ceremonion.


Unue estas necese diri, ke la uzo de la E-flago dum funebraj ceremonioj devas esti konforma al la uzo de ĉiuj aliaj standardoj ĉeestantaj tiu-okaze. Tio estas, se dum E-renkontiĝo okazanta en ŝtato ties registaro decidas, pro la okazigo de kelka damnaĵo aŭ kiel omaĝa memoro al iu pasinta okazintaĵo, duon-hisigi standardojn, la E-flago ankaŭ devas esti duon-hisigita. Tamen, se la omaĝo aŭ la damnaĵo okazas nur rilate la E-komunumon, ekzemple forpaso de elstara samideano, ni uzos nur la E-flagon dum tiu ceremonio. Tio ŝuldiĝas al la fakto, ke por uzi nacian standardon dum funebra ceremonio estas necesa la ekzisto de ŝtata aŭ loka akordo, se male, ni ne povos duon-hisigi nacian standardon, kvankam ja la E-flagon. Por solvi tiun aferon, tio estas duon-hisigi la E-flagon sed ne la aliajn, pli bone se dum tiu funebra ceremonio ĉeestas nur nia standardo.

Do, rilate la flagon de la E-komunumo dum funebraj ceremonioj jen kelkaj pri-atentindaj normoj:

- Se la flago troviĝas ekstere, ĉe balkono, pordo aŭ sur-strate, tio estas ne ene de fermita salono, oni duon-hisos la standardon aŭ oni metos nigran krepon sur la standardo. Sed atentu! Ni neniam plenumos ambaŭ aferojn samtempe, tio estas; oni ne povas pendumi nigran krepon ene de duon-hisigita flago. Unu afero aŭ la alia, sed ne ambaŭ sam-tempe.



Duon-hisigita E-flago



E-flago kun nigra krespo



Duon-hisigita E-flago kun nigra krespo

*Rifuzinda uzo de la E-flago !*


- Ene de salono oni neniam duon-hisos la E-flagon, tio estas komprenebla ĉar se ni duon-hisas flagon ene de salono, ĝi restos preskaŭ sur la planko kaj memoru, ke standardo neniam devas tuŝi la plankon. Do, okaze de funebraj ceremonioj ene de salono ni metos nigran krespon sur la E-flago.



Ene de salono oni metas nigran krepon en la E-flago



aŭ nigrajn kravatojn



Neniam, duon-hisita ene de salono

-

- Rilate la nigrajn krepojn, tiuj devas esti simplaj pendaĵoj, tute ne elaboritaj bel-aspektaj laĉoj.




La nigra krepo aŭ kravato

estas funebraj simboloj




Tute ne belaspekta ornamaĵo

- Rilate duon-hisadon de la E-flago oni devas agi laŭ jene:



Unue, oni devas hisi la flagon ĝis la plej alta pinto de la masto. Poste oni devas malsuprenirigi la standardon ĝis la duono de la masto.




Same rilate la malhisadon de la flago. Unue oni devas suprenirigi ĝin ĝis la plej alta pinto de la masto kaj poste malhisi ĝin.

# *Lastaj Informoj pri Standardoj*

## Aprobita la standardo de la turkmenoj en Sirio.

La pasintan monaton novembro okazis en la siria urbo *Al-Raie,* norde de Aleppo, renkontiĝo de la Konsilio Turkmena en Sirio. Ĉeestis reprezentantoj de politikaj partioj, civilaj asocioj kaj armeaj grupoj de ĉi tiu etna minoritato en Sirio. Oni aprobis tiam la novan standardon de la siriaj turkmenoj.



Laŭ oficiala deklaro de la Turkmena Konsilio en Sirio la hel-blua koloro reprezentas la turkmenan popolon, la blanka koloro la dezirojn de paco kaj homaranismo de ĉi tiu popolo, fine la kreska lun-kvarono kaj la ruĝa stelo omaĝas la martirojn de la siria nacio.

## Post publika konsulto oni aprobis novan flagon de *Sutherland*.

Komence de la jaro 2018 Graflando *Shuterland* en Skotlando, diskonigis siajn ĵus aprobitan standardon. Tamen, la dezajno ne multe plaĉis al la

loĝantaro, ĉefe pro la fakto, ke oni elektis novan flagon sen konsulti al la popolo de *Sutherland.* Tiel, la pasintan monaton oktobron la registaro de la Graflando organizis referendumon kaj tiam estis eble elekti unu el la kvar projektoj prezentitaj, inter ili tiu unue aprobita.


Jen tiuj 4 projektoj, necesas diri, ke oni ne aprobis definitive la unuan projekton de la loka registaro.



Flago unue proponita







Flago fine adoptita

## Nova flago de la Somala Regiono en Etiopio.

La orienta regiono de Etiopio, kies nomo estas Somala Regiono, re-ŝanĝis sian flagon. En la jaro 2009 la tiama etiopia Prezidanto S-ro Abdi Mohamoud Omar ŝanĝis la tradician flagon de la regiono kaj eĉ ties nomo, kun la celo eviti konfuzojn kun la apuda sendependa Somalia

Ŝtato. Tiel, antaŭe ĉi tiu regiono nomiĝis *Regiono Etiopi-Somala,* nuntempe la oficiala nomo estas nur Somala Regiono. La nova flago, kiu jam ekzistis antaŭe, denove aperigas ene de ĝi blankan stelon sur blua fono, ĉi tio aperas videblas sur la standardo de Somalio.



Flago de la Etiopi-Somala Regiono de la jaro 2009 ĝis 2018



Nuntempa flago de la Somala Regiono en Etiopio ekde la jaro 2018

# *La fotografaĵo de niaj legantoj*






Nia amiko ALEJANDRO BURGOS ESCALANTE de Teba (Hispanio) sendis al ni ĉi tiun fotografaĵon de la "Ruĝa Urbodomo" de Berlino (Germanio). Sur la pinto de la turo ondumas la berlina flago en la monato januaro 2019.


# *La kosova flago: la rezultoj de internacia konkurso*

En la jaro 2007-a la UN-administranto de Kosovo lanĉis ideon por aprobi novan flagon de Kosovo.  Oni rekomendis la uzon de koloroj aŭ simboloj reprezentantaj la etnan diversecon de la regiono, ankaŭ oni devus eviti la uzon de ununuraj koloroj aŭ de simboloj jam uzitaj de Serbio aŭ de Albanio, ekzemple la du-kapa ruĝa aglo.

Fine, oni prezentis preskaŭ 1000 dezajnojn.  En la monato februaro 2008-a oni elektis 3 projektojn kiu devus esti pridiskutataj ene de la Asembleo de Kosovo, jen ili:



La koloroj uzitaj reprezentas la etnan diversecon de Kosovo.



Simila proponita projekto aldonis nigran spiralon kiu reprezentas la sunan simboloj de la dardanoj.



Jen la projekto elektita de la Asembleo, kvankam fine temis nur pri modelo kiu metis la bazojn por la fine elektita standardo. Sur ĉi tiu propono aperas perimetra mapo de Kosovo kaj ĉirkaŭ ĝi kvin steloj, reprezentantaj kvin ĉefajn etnajn grupojn de Kosovo. Tiu kiu aperas supren estas pli granda, ĝi reprezentas la albanan grupon, preskaŭ 90% el la kosova loĝantaro.



Finfine, oni dezajnis la nuntempan kosovan flagon. Ĉi-foje ĉiuj steloj estas simile grandaj kaj ili aperas super la mapo de Kosovo, kiu ŝanĝis la koloron, oni elektis oran koloron (atentu ne temas pri flava koloro) anstataŭ tiu blanka de la unua projekto. La fona blua koloro memoras la gravan rolon de Unuiĝintaj Nacioj en Kosovo.

Jen kelkaj aliaj proponoj ne elektititaj:




Jen la propono prezentita de la unua kosova Prezidento S-ro Ibrahim RUGOVA, kvankam fine ne elektita, nuntempe ĝi estas la standardo de la Prezidento de Kosovo.  La albana influo sur ĉi tiu projekto estas okulfrapa.



Ĉi tiu propono anstataŭas la tradician albanan du-kapan aglon per du-kapa kolombo, aŭ eble ili estas du kolomboj, simbolo de la paco kiu devas regi inter ĉiuj etnaj grupoj de Kosovo.  La ruĝa albana fona koloro kaj tiu blua de Unuiĝintaj Nacioj ankaŭ aperas ene de ĉi tiu propono.



Vidite, ke oni ricevis proponojn ankaŭ de Usono !



La influo de Unuiĝintaj Nacioj estis videbla sur kelkaj proponoj, kvankam ĉi tiu ne sekvis regulojn proponitajn pri la ne-uzado de du-kapa aglo aŭ la uzo de ununura koloro, kiu sia-foje povus esti uzata sur la standardoj de Serbio aŭ de Albanio.

aeu

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto

# *La angulo de la blazonoj*

*Alejandro Burgos Escalante*



Blazono de TEBO (Hispanio)

TEBO *(hispanlingve TEBA)* estas vilaĝo en la nordo de la andaluzia provinco Malago. Ĝia historio estas longa kaj rakontinda, tamen okaze de ĉi tiu artikolo ni nur parolos pri la blazono kaj ties historio kaj signifo.

Ene de la una kvarono, tiu maldekstra, aperas kvin turoj. Ili reprezentas la grandan defendan forton kiu ĝuis Tebo dum la islama epoko. Sur la dua kvarono, tiu dekstra, aperas urso, kiu eble memorigas nin pri la blazono de Madrido, la hispana ĉefurbo, kaj arbo. Oni scias, ke la urso estas nova kreaĵo, tiel dum antikvaj tempoj aperis vulpo anstataŭ urso kaj la arbo estis pin-arbo. Tio certa estas la fakto, ke sur la blazono de la grafo de Tebo aperas baŭmanta leono kaj pin-arbo, do jen la origino de la blazono de Tebo. Sur la blazono aperas grafa krono, pro tio ke Tebo estas "*grafa urbeto*", en la hispana lingvo *villa condal.*



Stampo kun la antikva blazono de Tebo.



Blazono de la Grafo de Tebo

Kiel kunlabori kun **VENTO:**

- Estas bonvenaj ĉiuj kontribuaĵoj al nia revuo. Se Vi interesiĝas pri veksilologio ne hezitu sendi al ni artikolojn, informojn, desegnaĵojn, ktp. La kontribuaĵoj nepre devas esti verkitaj en la internacia lingvo Esperanto kaj temi pri veksilologiaj aferoj. Se temas pri blazonoj, ili devas aperi ankaŭ ene de standardo por tiel konsideri, ke ĝi ankaŭ rilatas al veksilologio.


- Sur ĉiu numero ni aperigos unu aŭ kelkajn fotografaĵojn senditaj de niaj legantoj. Ĉi tiuj fotografaĵoj devas esti originalaj, tio estas ne temas pri fotoj prenitaj el interretaj paĝoj. Sur tiuj fotografaĵoj devas aperi standardo(j). La sendanto devas sciigi pri la loko, kaj se eble ankaŭ la dato, de la fotografaĵo.

- Okaze de la sendo de artikolo aŭ informoj pri standardoj la aŭtoro devas eviti fari aprobajn aŭ mal-aprobajn politikajn komentojn pri la ŝtato, komunumo aŭ regiono de la flago. Nia revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn internaciajn aferojn aŭ movadojn.

- La revuo estas tute senpaga, do pro la sendo de kontribuaĵo oni ricevas neniun kontraŭ-pagon. Kompreneble la aŭtoro rajtas aperigi siajn personajn datumojn komence de la artikolo.

Kiel membriĝi en **V.E.N.T.O.**

- Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo deziras esti la organizo de la Esperanto-Movado rilatanta al veksilologiaj aferoj. La aliĝo al ĉi tiu asocio estas tute sen-paga. Estontece, kaj se ni atingas sufiĉan nombron da aliĝintoj, ni petos nian eniron en UEAn kiel fakan asocion. Por aliĝi al la asocio Vi nur devas sendi mesaĝon al nia adreso: esperanto14@ono.com




## Ni petas Vian kunlaboron !

Serĉata jena verko:

*“Heraldiko Veksilologio: Terminaro en Esperanto”* de

Jaroslav KLEMENT

Eldonita de České Budějovice, loka grupo de ĈEA, 1973

Se Vi havas ĉi tiun verkon, bv. kontakti kun nia revuo.


VENTO
Via veksilologia informilo en
ESPERANTO